

# KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ  
Jaro 42-a BRAZILO, APRILO-MAJO-JUNIO 2018 2018 N-ro 170

“Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”  
JESUO (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”  
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.  
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.”  
ZAMENHOF. *La Espero*.

## Indekso

- La Evangelio Laŭ Spiritismo* en Esperanto 1
- Amikoj de Lorenz 2
- Almanako Lorenz 2018 2
- Redakci-Artikolo 2
- Deklaracio 3
- Ŝatu Ĉian Vivon  
– Amai a Toda a Espécie de Vida 3
- Eta Ŝipo Surmaren Ĵetita 4
- Biblioteko Francisko Valdomiro Lorenz en Ĉeĥio 4
- La Pensoj Estas Fortoj  
– Os Pensamentos São Forças 5
- Neceso de Lingvo Internacia 5
- Kiel Valorigi “Zeojn”? 6
- Ni Ricevis Kaj Rekomendas 6

## La Evangelio Laŭ Spiritismo en Esperanto

Eurípedes Alves Barbosa

**S**piritismo estas doktrino, kies bazoj sidas sur kvin libroj verkitaj de Allan Kardec (pseŭdonimo de la franca pedagogo Hippolyte Léon Dénizard Rivail). Tiuj libroj estas konataj kiel la plej baza spiritisma verkaro, nome *La libro de la spiritoj*, *La libro de la mediumoj*, *La evangelio laŭ spiritismo*, *Genezo* kaj *La ĉielo kaj la infero*.

En aprilo 1864, en Parizo, Francio, aperis *La evangelio laŭ spiritismo*, kiu enhavas eksplikadon de la moralaj maksimumoj de la Kristo, ilian konformecon kun Spiritismo kaj ilian aplikadon al la diversaj situacioj de la vivo. Ĝi estas la plej legata libro en la vigla brazila spiritisma movado. Preskaŭ ĉiujare oni represas tiun libron en grandaj eldonoj en portugala lingvo.

En la enkonduko de tiu grava verko, Allan Kardec asertis:

Antaŭ tiu dia kodo (tio estas, la morala parto de la Evangelioj) eĉ la nekredanto kliniĝas; ĝi estas la kampo, kie ĉiaj kultoj povas kolektiĝi, standardo, sub kiu ĉiuj povas stari, kiaj ajn estas iliaj kredoj, ĉar ĝi neniam estis temo por la religiaj disputoj, ĉiam kaj ĉie naskitaj el demandoj pri dogmoj.

En Esperanto, *La evangelio laŭ spiritismo* aperis en 1947, tradukita el la franca originalo de Ismael Gomes Braga (bonega tradukaĵo, laŭ opinio de Porto Carreiro Neto), kaj eldonita de Brazila Spiritisma Federacio. Ismael estis bona stilisto, eleganta verkisto, kompetenta tradukinto.

Tiu tradukaĵo de Ismael ricevis la plej laŭdajn aprobojn de kompetentaj esperantistoj el la tuta mondo. Ekzemple: Julio Baghy, fama poeto kaj romanisto, el Hungario, ricevis ekzempleron de tiu libro, senditan de Ismael Gomes Braga kaj responde diris, ke la traduko estis je stilo internacia – bona kaj perfekta.

En la revuo *Esperanto*, majo 1948, paĝo 62, la recenzisto skribis, ke “la lingvo estas en modela, bela, klasika stilo, facilflua kaj klara. [...] ĉi tiu verko estas legenda kaj rekomendinda. [...]


La bulteno de la Reĝa Belga Ligo Esperantista, n-ro 8, februaro 1948, paĝo 74, aperigis la sekvantan recenzon:

Brazila esperantisto, S-ro Ismael Gomes Braga, faris tre gravan tradukan laboron, kiu estas eldonita de la Brazila Spiritismo Federacio. Ĝi estas titolita *La evangelio laŭ spiritismo*, kaj estas la traduko de franclingva verko de Allan Kardec. Tiu grava 432 paĝa libro estas unu el la diversaj, kiuj montras la kompletan taŭgecon de Esperanto por esprimi abstratajn ideojn. La ekzemplo por tiaj tradukoj venis de Zamenhof mem (*La malnova testamento*).

Eĉ en la tiama kaj fora lando Ĉeĥoslovakio, *La evangelio laŭ spiritismo* vekis atenton de esperantistoj. La gazeto *Esperantista* (revuo por Esperanto en Ĉeĥoslovakio), majo 1948, paĝo 62, aperigis longan komenton pri tiu verko. Resume la redaktoro diris, ke “tiu libro servas al du celoj: diskonigi la doktrinon de Kardec, ĉar multaj legos lian libron en tiu ĉi traduko unuan fojon, kaj denove pruvi lingvaj kvalitojn de Esperanto. Ambaŭ celoj estas atingataj eminente.”

La brazila medio Francisco Cândido Xavier, en letero de la 28a de oktobro 1947, adresita al Wantuil de Freitas, tiama prezidanto de Brazila Spiritisma Federacio, montris sian ĝojon pro la apero de *La evangelio laŭ spiritismo* en Esperanto.

Ni spiritistoj ŝuldas grandan dankon al Ismael Gomes Braga, ĉar li aldonis al la Esperanta literaturo tre gravan religian verkon, kiu disvastigas la Evangelion de Jesuo tra la mondo, sub la lumo de Spiritismo.





MAURO LIBÂNIO DA FONSECA estas unu el la fondintoj de nia Eldonejo, verkisto, spiritisto, esperantisto kaj financa direktoro de Lorenz. La verko de Mauro, eldonita de nia Eldonejo, O último êxodo (La lasta eliro), en la portugala lingvo, jam atintis la sepan eldonon.

Mauro estas aktiva spiritisto kaj esperantisto, kiu vere semas la bonon tersurface, vera disĉipulo de Jesuo kaj Zamenhof. Se vi, karaj ekster brazilaj samideanoj, volos ricevi la verkon de Mauro, tute senpage, petu kaj vi ricevu ĉi-belan libron.

Mauro, tre kara fratamiko, nome de nia Eldonejo, elkoran dankon! Dio vin benu!

En Gravaj Momentoj

**E**stu flegma. La vivo povas esti bona stato de lukto, sed militstato neniam estos bona vivo.

Ne tro rapide decidu. La cirkonstancoj, fruktoj de la Superaj Planoj, ĉiuminute aliigas niajn spertojn.

Evitu neoportunajn larmojn. Ploro povas kompliki la enigmojn, anstataŭ ilin solvi.

Se vi grave eraris, ne ĵetu vin en malesperon. Restariĝo estas la plej bona rimedo de la falinto.

Estu pacienca. Se vi ne sukcesas vin regi, vi vane klopodos pri kompreno ĉe iu, kiu vin ankoraŭ ne komprenas.

Se via afero estas tro kompleksa, atendu ankoraŭ unu tagon aŭ unu semajnon, por solvi ĝin. La tempo ne vane pasas.

Pretekstante defendi iun, ne enŝoviĝu en bruantan rondon. Kelkaj homoj faras multe da bruoj pro simpla afero de gusto.

Estu modera en viaj decidoj kaj sintenoj. En gravaj momentoj nia spirita realeco estas pli videbla.

Pri ĉia konsiderado de la personeco de viaj kunparolantoj aŭ de aliaj homoj estu singarda. En aliaj okazoj, aliaj personoj estos vokitaj paroli pri vi.

Neniam proklamu viajn proprajn meritojn, ĉar ĉia bonega kvalito estas duba en la kadro de niaj akiraĵoj. Memoru, ke virto estas ne voĉo parolanta, sed potenco disradianta.

El la libro: **Kristana Agendo** / FEB  
Spirito: Andreo Ludoviko  
Mediumo: Francisco Cândido Xavier  
El la portugala lingvo tradukis A. K. Afonso Costa



Almanako Lorenz 2018

**K**un granda ĝojo, finfine, jen nia tradicia *Almanako Lorenz*! Verkistoj el diversaj landoj partoprenas nian Jarlibron 2018: Probal Dasgupta, Renato Corsetti, Affonso Sores, Jarmila Rýznarová, Trevor Stelle, Benedito Silva, Vladimir Ienesov, José Passini kaj multaj aliaj kompetentaj samideanoj. Ni pliatentigas al niaj karaj legantoj, ke *Almanako*

*Lorenz*, kiel ĉiujare okazas, estas lanĉata okaze de la Brazilaj kaj Universala Kongresoj de Esperanto. Se la ekster brazilaj samideanoj volos ĝin ricevi, senpage, per paperformo, aŭ pdf-a versio, skribu al ni kaj kun grande plezuro ni tuj ĝin sendos al vi:

[editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br).

LORENZ

“KOMUNIKOJ”

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 42-a – n-ro 170 | Aprilo-Majo-Junio 2018

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj  
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz  
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal  
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brazilo (Brazilo)  
Telefonaĵoj: + 55-21-2452-9039 - + 55-21-2450-4768

Skaĵpo: Lorenz Editora | Fejsbuko: Editora Lorenz | Retadreso: [editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)  
Retpaĝo: <http://editoralorenz.blogspot.com.br>



Kompostita de Rogério Mota

Iam en la mond' astrala mi renkontis  
Eks-amikon el pasinta la ekzisto  
Sur la ter' ; li estis simpla instruisto.  
Ĝoje li brakumis min kaj tuj rakontis:

“Preskaŭ tri monatojn ni post vi forlasis  
La tervivon; mi promenis en arbaro  
Kiam kuglo trafis min, ja pro eraro,  
De junulo, kiu cervojn tie ĉasis.

Kiam vidis tiu hom' de l' fat' la baton,  
Malesperis, al river, profunda kuris;  
- nun ne povas mi plu vivi – li murmuris  
Kaj dronigis sin, pruvante vivmalŝaton.

Kiam poste li eksciis ke li mortis,  
Sed ke l' morto estas vivo nur alia,  
Petis li pardonon de l' justeco Dia,  
Konscienco lia lin al mi alportis.

Mi al li deklaris ke mi lin pardonas,  
Kaj li nun batalas kontraŭ ĉaspasio,  
Predikante ŝaton de l' vivenergio  
Eĉ en bestoj, kiel kornoblec' admonas.”



Uma vez no mundo astral encontrei  
um ex-amigo de passada existência  
na Terra; ele fora um simpres mestre-escola.  
Alegremente ele nos abraçou e contou-me:

“Quase três meses depois de ti deixei a vida  
terrestre. Eu estava passeando numa floresta,  
quando, por engano, me atingiu a bala  
de um mancebo que estava caçando veados.

Quando aquele homem viu o golpe da fatalidade,  
em desespero, correu ao profundo rio  
– Agora não posso mais viver” – exclamou ele  
e afogou-se, provando seu desprezo pela vida.

Depois, quando ele soube que morreria,  
mas que morte é apenas outra vida,  
pediu perdão à justiça de Deus,  
e a consciência dele o trouxe a mim.

Declarei-lhe que o perdoei,  
e agora ele combate a paixão da caça,  
pregando a estima a toda a energia viva,  
mesmo nos animais, como exige a nobreza do coração.”



Naskiĝis en 12 Nov 1864 em Lipka – Ĉeĥio kaj mortis en Pardubice. Li estis ĉeĥa esperantisto kaj dentkuracisto en Pardubice. Li estis entuziasma pioniro de Esperanto-movado en Ĉeĥio. Estis ankaŭ poeto, ĵurnalisto, redaktisto. Lasis plurajn rakontojn kaj poemojn apreciatajn de la Esperanta literaturo.

*Reformador*, Okt. 1952, p. 249  
Kunlaboris: Aymoré Vaz Pinto

## DEKLARACIO

Affonso Soares - Brazilo

**M**i konatiĝis kun la Societo Lorenz ne multajn monatojn post ĝia fondo en la 15-a de Decembro 1975. Tiam mi ricevis la honoran viziton, en mia laboroficejo ĉe Banko de Brazilo, de unu el ĝiaj fondintoj, la karmemora Délio Pereira de Souza. Li proponis al mi aniĝon al la ĵus fondita organizaĵo. Mi senprokraste kaj senkondiĉe akceptis, kaj jam

de tiam mi povis konsciĝi pri la promesplena, fekunda celado de la Societo, kies kerno ĉiam ankoraŭ estas la disvastigado tutmonda de la triopa idealo Evangelio-Spiritismo-Esperanto.

La amplekson de ĝia, por tiel diri, videbla, palpebla agado, ni povas taksu laŭ la nombro de membroj, laŭ la nombro de libroj, kiujn ĝi laŭstatute disdonas

al la membraro kaj al alilandaj institucioj, laŭ la nombro de libroj, kiujn ĝi mem eldonas, laŭ ĝiaj periodaĵoj, laŭ ĝiaj eventoj, sed ni tute ne povas havi klaran bildon pri la spiritaj atingoj de tiu celado, nome konsolado, morala fortigado, sekigo de larmoj, rekonstruo de fido kaj espero, krom multaj aliaj spiritaj bonoj, kiuj silente, senbrue ekestas en la koro de la homoj. Sed Dio, la

Majstro Jesuo, la Superaj Spiritoj ja havas klaran takson pri la spirita kontribuo de la Societo Lorenz por la starigo de la Regno de Dio en nia mondo.

Dio benu la jam 40-jaran, amatan Societon Lorenz, inspiru kaj protektu tiujn animojn, kiuj ĉimonde kaj transmonde servas al ĝiaj plej noblaj celoj kaj idealoj!

## BIBLIOTEKO FRANCISKO VALDOMIRO LORENZ EN ĈEĤIO

La 8an de julio okazis grava evento en la komunumo Vrdy (Ĉeĥio), al kiu nun administracie apartenas Zbyslav, la naskiĝvilaĝo de František Vladimír Lorenc (ĉeĥa formo de F. V. Lorenz).

La loka biblioteko portas ekde la 1a julio oficialan nomon “Knihovna Františka Vladimíra Lorence Vrdy” (Biblioteko Francisko Valdomiro Lorenz Vrdy), kaj dimanĉe, la 8an de julio, okazis senvualigo de la memortabulo pri F. V. Lorenz sur ĝia ekstera muro, produktita fare de la skulptisto kaj esperantisto Zdeněk Myslivec. La publiko konsistis el proksimume 100 personoj. El Brazilo salutis la ĉeestantojn la ĉeĥa ĝenerala konsulo el San-Paŭlo, s-ino Pavla Havlíková.

Post la enkondukaj vortoj de la urbestro Antonín Šindelář, la bibliotekistino Pavla Kobelová prezentis honorajn gastojn kaj skizis la programon de la posttagmezo. Sekvis prelego de Petro Chrdle pri la vivo kaj verko de F. V. Lorenz kun legitaj fragmentoj el la libro pri Zamenhof (estis cititaj Lorenz mem, el sia letero al fratino, lia amiko, kaj s-ino Novinski, eksa estro el la Muzeo de enmigrintoj en Dom Feliciano), kaj Pavla Dvořáková prezentis sian mur-ekspozicion pri F. V. Lorenz, kiu restos en la koridoro de la biblioteko. Post salutvortoj de sinjorino Havlíková, prezidantino de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Asocio de Handikapitaj Esperantistoj, oni menciis skribajn salutojn (inter ili ankaŭ la

viajn, sed ankaŭ de la pranepo de F. V. Lorenz, la ĉeĥa honora konsulo en Porto Alegre). Ĉiuj ĉi, kun la tradukoj, estis surtable por rigardo kaj restos konsulteblaj en la biblioteko.

Sekvis la propra senvualigo de la memortabulo fare de la konsulino el San-Paŭlo kaj urbestro de Vrdy, la tosto kaj refreŝiĝo, dume en prelegĉambro estis ripete projekciita ĉeĥe dublita 14-minuta brazila filmo pri Lorenz, kaj oni povis ankaŭ konatiĝi kun la libroj de la eldonejo Kava-Pech. Plej granda intereso estis kompreneble pri la libro de Vlastimil Novobilský, Francisco Valdomiro Lorenz: atesto pri la vivo kaj verko de eksterordinara homo, ne nur pri ĝia ĉeĥa versio, sed vendiĝis eĉ kelkaj en Esperanto.



### Eta Ŝipo Surmaren Ĵetita

Raymundo Souza



Mi estas eta ŝipo surmaren ĵetita,  
Kiel la nuboj en la ĉielo.

Mi estas simile senatenta fiŝeto  
Kiu de la logaĝo estas tentata.

Mi sentas min kiel kaheloj

Kiun ĉiuj admiras, sed ilian brilon eltiras.

Mi estas kiel kantema birdo,

Kiun ĉiuj volas arestita.

De' l eta ŝipo mi havas la malfortecon,  
De la nuboj mankas al mi la malpezeco,

De' l fiŝeto mi havas la naivecon,

De la kaheloj mi havas la piedsignon,  
Kaj de' l kantemaj birdoj mi havas nenion.



LORENZ

**KUNLABORU!** – Membriĝu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la devastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

**COLABORE!** – Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!

## La Pensoj Estas Fortoj

La pensoj, eĉ sen vortoj  
Tre grandaj estas fortoj,  
Kaj povas bonon krei  
Aŭ al malbon' obei.

Se iu pensas ŝteli,  
Mortigi aŭ ribeli,  
Spirite li jam faras  
Ja kion li preparas.

Se pensas li pri krimo  
Li iĝas tuj viktimo  
De krima la ideo,  
Gvidante al perejo.

Nu, pensu ĉiam bonon,  
– mi donas ĉi admonon, –  
Pensadu pri la sano  
Kaj pac', kaj ne pri vano!

Ne pensu pri milito  
Nek pri mirakla mito,  
Nek pri malsan', danĝero:  
Protektos vin l' espero.

## Os Pensamentos São Forças

Mesmo sem palavras, os pensamentos  
são grandes forças  
que podem criar o bem  
ou obedecer ao mal.

Se alguém pensa em furto,  
assassinar ou revoltar-se,  
em espírito já está fazendo,  
na verdade, tudo que está planejando.

Se pensa no crime,  
torna-se logo vítima  
da ideia criminosa  
que o leva à ruína.

Advirto-te, pois,  
que penses sempre no bem,  
na saúde, na paz,  
e nunca em coisas más!

Não penses na guerra,  
nem num mito milagroso,  
nem na doença, nem no perigo,  
e a esperança te protegerá.

Spirito: Abel Gomes  
Mediumo: Francisco Cândido Xavier

Reformador, FEB. 1946, p. 30  
Kunlaboro de Aymoré Vaz Pinto

## NECESO DE LINGVO INTERNACIA

"Tiamaniere, ne nur por la kontentigo de homaj pretendoj urĝiĝis la kreado de unu helplingvo, kiu interligus la teritoriojn de la spirito. Urĝiĝis ia sistemo de komuneco, kiu liberigus la batalantojn de la intelekta progreso, je pli grandaj embarasoj, por aliri al la plej altaj tipoj de kulturo..."

Milionoj da animoj deziregis liberiĝi de la lingvaj katenoj, mumiigantaj al ili la esprimojn.

Spiritoj kapablaj por vastaj flugadoj sur la ĉielo de la scienco kaj arto, de la instruo kaj industrio, limigis sin al la mensaj preceptoj kaj ritoj de la regionoj, kie ili agadis aŭ renaskiĝis, sufokitaj en la malvasta cirklo de malabunda vortprovizo, kvazaŭ iaj birdoj de majesta povo, enfermitaj en la fera kaĝo de malklereco."

Fonto: **Esperanto kiel Revelacio**

Spirito: F. V. Lorenz

Mediumo: Francisco Cândido Xavier

Eldonejo Lorenz, 2015, paĝo 12



En la lasta 02-a de junio, en Kuritibo, elektiĝis, por la trijara periodo 2018/2020, nova direktoraro de Brazila Asocio

de Esperantistoj- Spiritistoj: prezidanto Fábio André Evaristo dos Santos; vic-prezidanto João Marcos Borges kaj Azevedo;

unua sekretario Onício Cândido Nevo; dua sekretario Bruna Brasil Santos; kasisto Myrella Mendonça Brasil Santos; fiskaj konsilistoj

Eurípedes Alves Barbosa, Argeam Teles kaj Maia Eurípedes de Queiroz.

Sukcesojn al ĝi!

## Kiel Valorigi “Zeojn”?

**T**ra la mondo ekzistas multe da famaj vojoj, naciaj aŭ internaciaj: la Sankta Jakobo de Kompostelo estas konata pro pilgrado; la Vojo 66, pro la eblo trairi motorbicile Usonon de oriento ĝis okcidento (3945 Km); la Vojo Rikardo Leon’ Koro (fama batalanto), kiu donas aliron al kultura kaj arta heredaĵo; la Nacia Vojo 7, pro ties rara beleco kaj la Vojo Via Domitia, pionira irejo kiu ligas la Alpoj al la Pireneoj.

Do, pro diversaj kialoj, kelkaj vojoj estas tre konataj.

La ideo, ĉi-tie, estas krei la internacian vojon: ‘Esperanto’, danke al la ‘Zeoj’.

Sed, ĉu vi konas Zeojn? Zeoj ekzistas de longe sed, laŭ mi, ili ne estas sufiĉe konataj, bedaŭrinde.

Do, nun, mi deziras inviti vin pripensi tion kune: kiel valorigi Zeojn, cele estigi la esencon de la internacia vojo Esperanto?

Eble, ni povus publikigi libretojn kun ĉiuj Zeoj de la mondo kaj fari pasporton, kiu estus subskribita de la turismaj oficejoj aŭ la urbodomoj?

Do, la vojaĝantoj havus belegajn memoraĵojn de siaj vojaĝoj kaj Esperanto estu pli konata en la institucioj.

Ĉu vi havas aliajn ideojn?

Bonvolu skribi al la ĵurnalo.

Dankon, ĝis tre baldaŭ!

Izabelmondo

(Zamenhof/Esperanto-Objektoj, ofte mallongige ZEO, estas diversaj objektoj nomataj honore de L. L. Zamenhof aŭ Esperanto. Ĉi tiu mallongigo estis unue uzata en la libro de Hugo Röllinger Monumeto pri Esperanto – ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto Objektoj en 54 landoj. ZEOj povas esti stratoj, placoj, monumentoj ktp.)

## NI RICEVIS KAJ REKOMENDAS

# La Bulteneto

Numero 19 • René de Saussure - Jaro 2018

ISBN 978 3 903247 19 2

La cifereca versio estas senkosta.

Informoj pri la tarifoj de la presita versio kaj anoncoj: [esperanto@chello.at](mailto:esperanto@chello.at)

  
MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ  
**INFORMILO** 5

MAJO 2018 Kol. 397/34

Monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj  
+ suplemento ANTAŬEN

Kontakto: [aeh@esperanto-aeh.eu](mailto:aeh@esperanto-aeh.eu)

테라나도



# TERANIDO

BULTENO DE BUSAN-GYBONGNAM FILIO DE KOREA ESPERANTO-ASOCIO  
FONDITA EN 4-A JULIO 1981 / REKOMENCITA EN 22-A DECEMBRO 2007

[HTTP://TERANIDO.BLOGSPOT.KR](http://TERANIDO.BLOGSPOT.KR)

## SENPAGAJ LIBROJ...

Ĉiuj kiuj loĝas ekster Brazilo rajtas ricevi niajn librojn, en Esperanto, tute senpage. Sufiĉas nur sendi vian kompletan nomon kaj poŝtadreson al [editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)

